

La Kalumeto

la bulteno de “Projekto Indiĝenaj Popoloj »
oktobro-decembro 2010

« Projekto Indiĝenaj Popoloj » celas prezenti Esperanton al indiĝenaj popoloj tra la mondo kaj faciligi komunikadon inter indiĝenaj popoloj kaj individuoj per Esperanto. Ĝi celas ankaŭ informi esperantistojn pri la situacioj de indiĝenaj popoloj kaj pri kiel popoloj indiĝenaj kaj ne-indiĝenaj povas interagi. Ni kredas ke indiĝenaj popoloj ofte alfrontas similajn situaciojn, exemple: perdoj de terenoj, mondoperceptoj, kaj tradicioj. Ni plu kredas ke komunikado, per Esperanto aŭ alimaniere, helpas indiĝenojn subteni unu la alian kaj pli bone diskonigi siajn kulturojn. Samtempe, PIP komprenas ke multaj indiĝenaj grupoj sentas profundan bezonon revivigi, gardi, kaj antaŭenigi siajn proprajn lingvojn.

Kongresaj citaĵoj:

Citaĵo de la prezidanto de UEA, Probal Dasgupta, dum la Solena Malfermo de la Universala Kongreso de 2010:

“Antaŭe la idealistoj kutime pledis por idealoj unuecigaj. En unu lando ili pledis por nacia unuecigo. Sur la monda skalo ili strebis al harmonio, kiun ili komprenis kiel sendivide, sendiference unuecigitan homaron. Sed ni hodiaŭ lernas deziri unu konektitan planedon, kiu estimas kaj flegas ĝuste la diversecon. Tiu ĉi lernado okazas ne nur en Esperantujo: la media katastrofo devigas nin serĉi vojojn por savteni la vivdiversecon kaj disvolvi aliajn parencajn diverseco-ideojn. Sed ni esperantistoj jam delonge pioniris, kaj veterane kultivas, similan kampon. Ni laboras por savteni la diversecon de konversacioj.

“Ni aspiras al tutplaneda konversacio inter la lokaj kaj regionaj konversacioj, kiu savtenas ilian lokan kaj regionan viklecon kaj pere de ili la demokration.”

Certe ni laboras por savteni la diversecon de konversacioj. Ĝuste pro tio, ni konscias pri la malfacileco de tiuj konversacioj kun indiĝenaj kulturoj kaj la anoj de tiuj kulturoj.

Ekzemple, kiel oni konversacias kun indiĝeno kiu kredas ke li aŭ ŝi ne nur devus esti la posedanto (unuope aŭ grupe) de iu tereno, sed ke li aŭ ŝi estas ligita al tiu tereno per antikvegaj (sed ankoraŭ validaj) okazintaĵoj mitaj?

Kiel oni konversacias en indiĝena grupo kiam ero de tiu grupo daŭre kredas je tradicia religio dum alia ero kredas je religio alportita de ne-indiĝena grupo, religio kiu ligas la indiĝenojn ne kun ilia pasinteco kaj loĝloko, sed kun homoj en aliaj lokoj kiuj havas aliajn kulturojn?

Multajn ekzemplojn oni ja povas trovi rilate je diversaj aspektoj de la vivoj de indiĝenoj kaj ne-indiĝenoj. Pri ĉiuj el ili, la konversacio certe indas kaj endas. Necesaj por tiaj konversacioj estas ne nur ambauflanke komprenebla(j) laborlingvo(j), sed ankaŭ la kapablo kaj la emo kompreni ĉiujn flankojn, ĉiujn aspektojn de la demandoj kiujn oni alportas al la tablo.

Citaĵo de Jose Antonio Vergara, el la Solena Malfermo de la Universala Kongreso de 2009:

“Kial dum tiu solenaĵo mi ekhavis la ideon peti la landajn reprezentantojn saluti ne kiel kutime, sed per la propra etnolingvo? Eble ĉar mi kredas ke ni estas komunumo pli ol averaĝe sentema, konscia, kaj respondeca pri la homa fenomeno lingvo, kaj mi preferus ke ni estu rigardataj ne kiel movado sin okupanta nur pri Esperanto, sed kiel aktivularo ku laboras per ĝi atentige pri kaj favore al la lingvoj, ĉar fascinita de tiu komuna trezoro. Nu, ni dum kelkaj minutoj ĝuis tian vere belan, larĝan spektron de sonoj, tonoj, vortoj kaj esprimoj kiujn la homoj uzas por amike kaj bondezire saluti amason.”

Kelkfoje vidata (kaj ofte ŝatata miaflanke) estas salutkartoj kiuj portas bildon de domopordo. Ofte la pordoj estas tradiciaj, ornamitaj, buntaj....kaj interesaj ĉar ili vokas al ni. Ili kvazau'diras ke ili ekzistas por la enirado, kaj tiu “diro” kreas en ni la demandon: Ĉu mi rajtas eniri per tiu pordo? Ĉu je la alia flanko estas io por mi?

La vortoj de Jose Antonio Vergara povas simile pensigi nin. Lingvo iom similas al domo; la muroj malpermesas la eniron, kaj la pordoj permesas tion. Lingvoj simile malpermesas au' permesas eniradon al kulturo kaj mondopercepto. Se s-ro Vergara ne malfermis pordon al indiĝena lingvo dum la kongresomalfermo, li almenau' malfermis fenestron, kaj tiel donis al la au'dantoj ekvideton de la vivo en tiu lingva “domo”: Viro parolas tiel. Virino parolas alimaniere. Oni parolas tiel al grupo, sed alimaniere al unuopulo, kaj simile. Ne temas pri perfenestra fi-gvatado, sed pri ekstermura deziro ekscii kiel aliaj homoj komunikas. Ni kiuj estas anoj de PIP alte estimu Esperanton kaj niajn gepatrajn lingvojn, sed ni ankau' alte estimu lingvojn ege malsimilajn je la niaj, ĉar ĉiuj estas eroj de la “homa fenomeno,” lingvo, pri kiu s-ro Vergara larĝanime pensigis nin.

Vojaĝo inter koloropunktoj (ej?)

La organize Cyark registras per laserfaskoj homajn kreitaĵojn. Flanke al fotoj kaj vortoj, tiuj faskoj povas informi al ĉiuj pri eroj de homa kulturo, kaj ĝuste tian informadon kaj interpretadon ofertas Cyark.

La preskau' senfinaj registropunktoj/informopunktoj kiujn produktas la skaniloj permesas la kreadon de ege densaj punktaroj, au' “punkto-nebuloj,” kiel Cyark esprimas la fenomenon. Oni povas legi tiujn punktarojn pli-malpli kiel oni legas fotografaĵon, sed la legebla informo multe pli abundas. Ekzemple, oni povas ĉirkau'rigarde vidi ĉiujn flankojn de konstruaĵo, au' samtempe vidi internajn kaj esternajn murojn. Krom tio, la tekniko povas klarigi ĉu iu reparis konstruaĵon au' similaĵojn, au' alimaniere aliigis ĝin. Pro kaj per ĝiaj kapabloj, la teknikoj kaj ties utiligado flanke de Cyark donas al spektantoj intiman ideon pri...kio?

Cyark vizitas gravajn historiajn kaj kulturajn sitojn tra la mondo—eĉ la mergitan ŝipegon Titanic. Inter tiuj sitoj estas kelkaj eble interesaj al anoj de PIP: Pask-insulo, indianaj sitoj en Meksiko, Peruo, kaj Usono, kaj la antau'nelonge bruligita tombejo de bugandaj reĝoj en Ugando. Aliaj sitoj ĉe Cyark nun prepariĝas.

Fontoj: Revuo National Geographic (Usono) oktobro 2010, kaj Cyark ĉe cyark.org.

Premiitoj de Unesko

Unesko anoncis la premiitojn por 2008-2009 por plibonigo de komunikado rilate kamparanojn. La aljuĝitoj estis unu organizo, “La Voz de los Campesinos/La Voĉo de la Kamparanoj” kaj unu individuo, (s-ro) Amr Mamdouh ELLISY.

La Voĉo de la Kamparanoj estas radiofona stacio kiu funkcias en la meksika urbo Veracruz. Ĝi dissendas per tri indianaj lingvoj kaj la hispana. Krom tiu interlingva servado, ĝi instigas interkomunikadon kun indiĝenaj komunumoj kaj la kundividon de muziko, historio, kaj kutimoj. Ĝi instigas ankaŭ la efikigadon de la rajtoj de indiĝenaj komunumoj. La Voĉo de la Kamparanoj servas proksimume 400 komunumojn/100,000 homojn.

Amr Mamdouh Ellisy estas egipta redaktoro ĵurnala kaj televida. Liaj amaskomunikaj prezentoj informas kamparanojn, precipe pri sano kaj edukado. Ankaŭ s-ro Ellisy kontaktas registarajn instancojn kaj ne-registarajn organizojn por trovi justajn solvojn al sociaj problemoj en kamparanaj regionoj.

La premiitoj dividis 20,000 usonajn dolarojn.

(Fonto: Unesko)

Vilaĝestroj estras por komuna avantaĝo—kun manĝo!

Fiŝkaptado estas tradicie vira maniero de vivtenado en la Federitaj Ŝtatoj de Mikronezio. Oni tie fiŝkaptas por familia nutrado kaj, pli antaŭnelonge, por vendado.

Pro la nuna kvanto da fiŝkaptado, provizoj de fiŝoj danĝere malaltiĝas, kaj la starigo de ŝirmejoj por la fiŝoj ne helpis la situacion. Fakte, la fiŝokvantoj en la ŝirmejoj estas pli malaltaj ol tiuj en la neŝirmitaj fiŝkaptaj akvoj. Ŝtelŝiŝkaptistoj aktivigas!

Mikronezio nun havas modernan (tio estas, netradician) jurosystemon. Sed tiu sistemo ne kapablis limigi la ŝtelŝiŝkaptistojn. Nun oni iom reaktivigas la tradiciajn respondecojn de la vilaĝestroj por ŝirmi per kutimoj, ne per leĝoj, la fisojn en la ŝirmejoj.

Al vilaĝa renkontiĝo kiun okazigas tradicia vilaĝesto invitiĝas la akuzitaj fiŝkaptistoj kaj iliaj familianoj, tradiciaj estroj de apudaj vilaĝoj, registaraj funkciuloj, kaj reprezentantoj de koncernaj ne-registaraj organizoj. La familianoj de la akuzitaj fiŝkaptistoj devas provizi manĝojn por ĉiuj. La akuzitaj fiŝkaptistoj povas defendi sin, sed tipe devas peti la pardonon de ĉiuj ĉeestantoj. La vilaĝestroj tiam memorigas al ĉiuj pri iliaj komunaj respondecoj rilate natur-rimedojn. Kunvenofine, ĉiuj kundividigas la tradician trinkaĵon “sankau” (kavao-simila, malstreĉiga), farita el pistitaj radikoj. Tiel la vundo de la komunumo saniĝas. La sekvantan tagon, la ŝtelŝiŝkaptistoj partoprenas komunuman fiŝokomptadon.

La loka, ne-tradicia registaro subtenas la tradician agadmanieron pro ĝia efikeco.

Rimarko: La artikolo el kiu mi ĉerpis la infomojn ne pritraktis ekonomiajn kaj nutrajn alternativojn al dau’ra trokaptado de fiŝoj. Ĉu la tradiciaj solvoj estos nur mallongdau’re efikaj?

(Fonto: “Fish and Tradition” (“Fiŝoj kaj Tradicioj,” Nature Conservancy Magazine

(Usono), au'tuno 2010.)

Ĉu Respondoj?

Eu'ropa leganto de "La Kalumeto" antaŭnelonge sendis la jenan mesaĝon: "Ni esperantistoj ne bezonas la indighenajn lingvojn. Kial kampanji por ili?"

Ĉu iu deziras respondi al tiu demando? La respondoj povas rilati je personaj au' pli larĝaj temoj.

Speciala novaĵo...

S-ro Philippe Chavignon, ano de PIP, ricevis la premion Onisaburo Deguĉi dum la Universala Kongreso en Havano. La premio honoras al tiu, kiu antaŭenigas internacian amikecon kaj solidarecon.

S-ro Chavignon dum jaroj laboris diversmaniere kaj diverscele por UEA, precipe en Afriko kaj Latina Ameriko. Li fukciigis projektojn pri ekoturismo, kaj antaŭ la ĉi-jara UK li organizis ekskurson tra Gvatemalo.

Gratulojn, Philippe Chavignon!

Ili Ordonis

Ili ordonas ke mi iru kun ili, por ke mi estu sekura.

Mi faras tion, sed mi ne sentis min sekura.

Ili ordonas ke mi tondu mian hararon, por ke ĝi ne obstrukcu min.

Mi faras tion, sed kien falos mia saĝeco?

Ili ordonas ke mi ŝanĝu mian nomon, ĉar ili ne povas elparoli ĝin.

Mi faras tion, sed kiu mi nun estas?

Ili ordonas ke mi neniam parolu mian lingvon, ĉar ĝi estas veneno.

Mi faras tion, sed kiel mi parolos?

Ili ordonas ke mi neniam rigardu orienten por preĝi.

Mi faras tion, sed kiel mia kreinto au'dos min?

Ili ordonas ke mi lernu la agmanierojn de la blankuloj.

Mi faras tion, sed kio pri miaj agmanieroj?

Ili ordonas ke mi neniam retrorigardu mian kulturon au' vivmanieron.

Mi faras tion, sed kiel mi vivos ekde nun?

Ili ordonas al mi ke mi portu iliajn vestojn, por ke mi aspektu kiel ili.

Mi faras tion, sed mi ne rekonas la personon kiun mi respegulas.

Ili ordonas ke mi faru ĉiujn el tiuj faroj.

Mi faras ilin por ke mi povu hejmeniri, lau' iliaj promesoj.

Verkis (s-ino) Shaina April Nez, Usono, anino de la navahoa tribo.

S-ino Nez informas ke ŝi verkis la poemon lau' la klarigoj kiujn ŝi ricevis kiam ŝi studis la travivaĵojn de indianaj geknaboj en pensionlernejoj dum la jaroj 1885 ĝis 1889.

El "La Cirklo Malliberige Enfermas la Nomadojn" de Kamoriongo Ole Aime'rru Nkongoni, Families of the Earth and Sky [Familioj de la Tero kaj Ĉielo], redaktis (s-ro) John ELDER kaj (s-ino) Hertha D. WONG, Usono, 1994.

"Nuntempe homoj tro restas samloke. Ili deziras esti apud akvo, sed ankau' la registaro deziras ke ili unuloke restu. Ĝi diras ke ĉi tiu tereno apartenas al ĉi tiu klano kaj tiu tereno apartenas al tiu klano. Nun oni eĉ povas trovi terpecojn kiuj apartenas al unuopuloj, afero kiu, antau'e, neniam okazis. Eĉ tiam, la masaj-gento permesis al aliuloj ke ili paŝtu sur sia tereno. Se ne, kio okazus kiam ili mem travivus senpluvecon? Tiam, eble ili necesus paŝti aliterene.

"Evidentas ke ni devas helpi unu al la alia. Antikve, post senpluveco, se bonŝance restis vivaj al iu kelkaj el siaj bovoj, li devas doni kelkajn al parencoj kiuj perdis la siajn. Tio ne ofte okazas hodiau'.

"Pli kaj pli malfaciliĝas movi de unu loko al alia, ĉar oni donas al kelkaj personoj iujn teropecojn, kaj oni asignas al iuj personon sekajn teropecojn, kaj pro tio, ĉi tiuj homoj devas dependi de tiuj, al kiuj oni donis bonajn teropecojn. Koncerne la masaj-genton, gravas ke oni posedu unu "manjato-n,"* por la seka sezono kaj alian por la malseka sezono. Kiel tio eblas se ĉiu homo posedas nur unu teropecon? La bovoj eble devus vojaĝi longe por atingi bonan paŝtoterenon, kaj ili estus lacaj. Sed se ili restas samloke, paŝtejoj ne reviviĝas, kaj la bestoj estas malfortaj. Tio okazas nun. La bestoj estas senfortaj, kaj ili donas malmulte da lakto. Rezulte, infanoj suferas.

"Kelkaj el la lokoj al kiuj ni antau'e kondukis niajn bestojn nun estas registaraj parkoj, kaj ni ne plu rajtas iri tien [kun niaj bestoj]. Tio estas maljusta. Ni devus rajti tien konduki niajn bestojn, almenaŭ dum la sekaj sezonoj. La masaj-gentanoj ne ĝenas la sovaĝajn bestojn; ni ne trudas je ili ĉar ili estas ero de la dia kreado."

manjato: ĉirkau'barita loko kun kabanetoj kaj centra vakejo kie bovoj povas dormi.

"Mi povas montri...."

Nomadaj kantoj de la Himalaja Montaro

"Mi estas persono de verdaj paŝtejoj; sole mi paŝas, mi melkas la bonŝancan ŝafinon blankan. Vi, ankau' nomado, povas iri kun mi; ni povos melki la blankajn kaj nigrajn poefagojn."

(Kanto de persono kiu esperas ke iu kante respondos.) "Ĉe la alia bordo de la rivero, gazonecas floroj blankaj, flavaj, ruĝaj kaj bluaj. Mi povas montri tiun, kiun mi plej multe ŝatas."

(Fonto: Drokgye Khan Home, Interreto.)

El: “La Vojoj de la Homaro” [anglalingve, “The Routes of Man”], verkis Ted Conover, eldonis Alfred A Knopf, 2010

Ĉiu vojo estas historieto de strebado: por profito, por batalvenko, por eltrovado kaj adventuro, por transvivado kaj kreskado, au’ simple por baza komforto. Ĉiu pado respegulas nian deziron movi kaj kontakti. Iu, kiu ricevas avantaĝon pro la ekzisto de vojo—vojaĝo pli mallonga, pli glata, au’ malpli danĝera—povas atesti pri la graveco de bonaj vojoj. Sed kiam homoj strebas, ankau’ ni eraras, kaj estas malfacile konstrui sen detrui. Robert Moses, la diskutata kreinto de ŝoseoj meze de la dudeka jarcento, detruis diversajn najbarejojn pro siaj projektoj, kaj el viglaj komunumoj (notinde South Bronx) faris dezertigejojn kiuj ankoraŭ ne revigliĝis. Pri siaj agadoj li famkonate diris, “por prepare omleton, oni devas rompi kelkajn ovoŝelojn.” Simile, la sama vojo kiu portebligas medikamentojn ankau’ plirapidigas la disvastigon de malsanoj; la samaj vojoj kiuj ebligas al la homoj kiuj deziras ilin pli larĝajn kontaktojn kaj sciojn, kelkfoje okazigas la finon de indiĝena kulturo; la samaj vojoj kiuj subtenas la disvolviĝon de la homa ekonomio, ekokazigas la detruadon de nehoma medio; la samaj vojoj kiuj veturigeblas au’tojn kiuj simbolas personan liberecon ankau’ okazigeblas la mortojn de pli da homoj ol la kvantoj kiuj mortis en militoj, kaj de nenombreblaj bestoj; la samaj vojoj kiuj ebligas al ni ekkonon de amikoj ebligas ankau’ kontakton kun malamikoj.”

Mesaĝo de la redaktoro

Ĉu vi kelkfoje scivolas kial multaj el la tradukaĵoj kiuj aperas en “La Kalumeto” estas tradukitaj el la angla? Ĉu vi rimarkas ke artikoloj pri indiĝenaj popoloj ofte pritemas indianojn, precipe indianojn de Usono? Se jes, mi povas malscivoligi vin. La kialo de tiuj situacioj estas ke mi tre malofte ricevas de legantoj de ĉi tiu bulteno artikolojn au’ tradukaĵojn. Por pli realisme bildigi la situaciojn de indiĝenaj popoloj kaj individuoj, kaj por plilarĝigi la opiniaron kiu aperas en “La Kalumeto,” verku kaj raportu ankau’ vi, mi petas.

Erik Felker--PIP / 414 E. Cedar Ave., Apt. 11 /

Burbank, CA 91501 / U.S.A.--Usono

Erik Felker <ejfelker @ dslextrreme.com>